



LA VERDA TRISKELO

2 numéros par an - parution : printemps / automne
VT 51 - oktobro 2023



Legu pri la okazontaĵoj / Agenda au verso

Multaj informoj atendas vin !

Enhavo

Edito	p 2
La Federacio	p 2
Lokaj korespondantoj	p 4
Rilate al heredaĵo	p 5
Okazis kaj okazos	p 6
Anoncoj	p 7
Omaĝoj	p 8
Fremdaj Vizitintoj	p 9
Pri lingvoj	p 12
Traduko de libro	p 16
Sumoo legado	p 17
Agendo	p 22

COTISATION 2023

- y avez vous pensé ? -

Même si vous ne suivez pas de cours,
même si vous n'êtes pas actif, soutenez
l'Espéranto et restez informé.

Adressez-vous soit à votre correspondant
local si vous adhérez à un club, soit à
Xavier Godivier (coordonnées p.4)
pour adhérer à la fédération
uniquement .

AUX INTERNAUTES

Site internet :

<http://bretonio.esperanto-france.org>

Pour vous inscrire à la liste de diffusion
Bretonio et ainsi recevoir des nouvelles,
plus fraîches et plus nombreuses,
envoyez un message vide à l'adresse :
bretonio-abono@esperanto-france.org

Espero de pli bona mondo!

Militoj, klimatsanĝo, minacoj kontraŭ la naturo, kresko de malegaleco kaj kresko de timoj pri ĉiuj tiuj riskoj... Fronte al tiuj minacoj kaj timoj oni povus pensi ke Esperanto ne tiom gravas kaj ke indus zorgi pri tiuj pli gravaj aferoj.

Gravas tiam memori la signifon de la nomo de nia lingvo! Jes ja se "Esperanto" rapide anstataŭis la originan nomon "Internacia Lingvo", estas precize ĉar tiu lingvo alportas "esperon", espero de pli bona mondo, pli paca, pli frateca inter la homoj.

En nia nuna epoko estas precize tio kion ni bezonas por la estonteco: havi esperon! Esperanto ne estas mirakla solvo por nia mondo sed povas partopreni por redoni esperon proksimigi homojn en tiu periodo de kresko de malharmonio en la mondo.

Ni estu do dankemaj al ĉiuj kiuj daŭre klopodas por Esperanto ĉu en sia loka klubo, ĉu per Interreto al homoj de aliaj landoj, ĉu per organizado de Esperanto-eventoj. Ĉiuj tiuj agadoj helpas fortigi esperon de pli bona mondo!

Xavier Godivier

L'espoir d'un monde meilleur !

Guerres, changement climatique, menaces contre la nature, croissance des inégalités et croissance de la peur de tous ces risques... Face à ces menaces et peurs, on pourrait penser que l'espéranto n'est pas si important et qu'il faudrait s'occuper de ces causes plus importantes.

Il faut alors rappeler la signification du nom de notre langue ! Oui en effet si le nom « Espéranto » a rapidement remplacé le nom initial « Langue internationale », c'est précisément parce que cette langue apporte un « espoir », l'espoir d'un monde meilleur, plus pacifique, plus fraternel entre les hommes.

À notre époque actuelle, c'est exactement ce dont nous avons besoin pour l'avenir : avoir de l'espoir ! L'espéranto n'est pas une solution miraculeuse pour notre monde, mais il peut participer à redonner l'espoir de rapprocher les êtres humains dans cette période de discorde croissante dans le monde.

Nous devons donc être reconnaissants envers tous ceux qui continuent à s'affairer pour l'espéranto, soit dans leur club local, soit via Internet auprès de personnes d'autres pays, soit en organisant des événements d'espéranto. Toutes ces activités contribuent à renforcer l'espoir d'un monde meilleur !

Xavier Godivier

Compte-rendu AG du 2 avril 2023 à Loudéac

Après 2020 (covid, AG en visio), 2021 (AG à Plouézec + visio), 2022 (AG à Grésillon + visio), la fédé a repris ses vieilles habitudes et s'est réunie à Loudéac. 12 présents et 6 procurations.

Rapport d'activité

La dernière version du VT50 est disponible sur le site de la fédé, en couleur. Merci à l'équipe Ŝanjo, Josette et Hélène. Il n'y avait pas eu de VT en 2022. L'impression papier est à la charge des clubs (c'est souvent un bon support de cours) ; ceux qui souhaitent recevoir directement une version papier peuvent en faire la demande à Manjo ([manjo.clopeau\(at\)gmail.com](mailto:manjo.clopeau(at)gmail.com)).

Denis se charge de contacter la bibliothèque nationale pour savoir s'ils acceptent une version PDF. (la réponse arrive quelques jours après : la BDF accepte uniquement la version papier, pas de PDF).

Le nombre des adhésions est difficile à estimer, car les clubs n'ont pas tous envoyé leur cotisation (il est toujours temps de se mettre à jour (8 € par membre, 12 par couple, 4 pour petit budget, joindre Manjo). 2 assos, Armor et Rennes ont opté pour la cotisation groupée à EspérantoFrance, qui reverse une part à la FEB. Actuellement il y a 58 adhérents à Espéranto-france, soit directs, soit par une des 2 associations Armor ou Rennes. Il est rappelé que la FEB peut aider financièrement un membre pour un stage, un congrès, ou l'organisation d'un évènement.



La FEB a organisé la tournée de Murat (Turquie) en novembre, et a aidé au voyage en Bretagne de Oksana (Ukraine) et de ses deux filles en juillet, voir détails dans VT. Pour les prochaines tournées : idée de contacter les étrangers participants aux stages de Grésillon, ou les jeunes de TEJO. Décision également de contacter Svetlana, ukrainienne qui habite actuellement à Paris, pour une conférence sur l'Histoire de l'Ukraine, Jean-Claude Dubois se charge de la contacter, ce pourrait être pour juin.

Tour d'horizon des clubs : les assos vivent au ralenti, mais il se passe quand-même des choses : Vannes : 1 bablado par semaine, 2 samedi après-midi récréatifs. Lannion : 1 cours avec Maya, 6 progresantoj et 1 débutant. l'ENSSAT de Lannion, 1 table espéranto lors de la journée des langues. Binic : participation au forum des langues, de nombreux participants aux sessions d'initiation de 1 heure. St-Brieuc : 2 studperiodoj Plouézec : cours notamment dans les écoles. Hennebont-Lorient : 1 bablado par semaine. Dinan : 1 cours par quinzaine. Café des langues à Vannes, Douarnenez, Morlaix.

Des Bretons voyagent : Marielle (Pontivy) participe régulièrement aux congrès de SAT-Amikaro, cette année à Bourges, SAT en juillet à Grésillon. Maya et Manjo ont participé au chœur international sous la direction de Zdravka, lors de la journée internationale de la paix, sous l'égide de l'Unesco, à Tolosa en pays basque espagnol. participations aux stages de Grésillon, de Bourses. Le prochain congrès universel aura lieu à Turin en 2023 et en Tanzanie en 2024. le prochain congrès de Espéranto-France aura lieu du 6 au 8 mai à Lyon, et celui de Sat-Amikaro à Bourges. Le rapport d'activité est approuvé.

Le rapport financier est consultable sur le site, il est approuvé.

Élections du CA : pas de nouvelles candidatures, les membres actuels sont renouvelés. Le CA est composé de : Marielle Giraud Amapola Triguéro Jannick Huet Maryvonne Pennec Denis-Serge Clopeau Claude Bensimon Laurent Peuch Manjo Clopeau Xavier Godivier

Lokaj korespondantoj kaj kursoj.

22	Armor Esperanto	Murielle Caré	06 70 60 58 18	murielle.care(a)me.com
22	Saint-Brieuc	Laurent Peuch	06 89 86 12 97	ltpeuch(a)me.com
22	Plouézec	Jeanne Pouhaer	09 62 30 40 05	jeanne.pouhaer(a)orange.fr
22	Locquémeau-Cavan	Anne Desormeaux	06 04 01 27 64	anne_desormeaux(a)yahoo.fr
22	Lannion	Maja Mériaux	06 04 49 84 48	meriaux.family(a)wanadoo.fr
22	Pleudaniel	Pierre Cardona	06 99 38 20 89	kortep(a)gmail.com
22	St Michel-en-Grève	Hélène Dubois	02 96 35 73 06	helene22dubois(a)gmail.com
22	Rostrenen	Françoise Noireau	06 09 12 03 74	desirdapprendre(a)gmail.com
22	Dinan	Philippe Stride	02 96 27 87 43	<u>philippe.stride(a)wanadoo.fr</u>
29	Douarnenez	Chantal Allen	06 74 15 78 09	chantalallen9(a)gmail.com
29	Morlaix	Claudine Guégen	06 86 88 44 69	Esperantosolidareco(a)gmail.com
35	Rennes	Xavier Godivier	06 51 45 84 83	xgodivier(a)esperanto.org
35	Montfort-sur-Meu	Josette Ducloyer	06 35 32 02 00	jpducloy(a)gmail.com
35	St Malo	Anne-Marie Argney	02 99 40 24 86	amargney(a)wanadoo.fr
56	Hennebont	Yvette Veslin	02 97 36 08 75	herve.veslin(a)orange.fr
56	Lorient	Jean dit Yannick Le Guennec	06 78 59 98 56	jean.le-guennec(a)wanadoo.fr
56	Hennebont+Lorient	Claude Bensimon	06 22 08 29 32	cloesb(a)yahoo.fr
56	Pontivy	Marielle Giraud	02 97 27 76 98	liber.terre(a)wanadoo.fr
56	Rhuys	Francis Desmares	02 97 26 89 96	francismsg56(a)gmail.com
44	Nantes	Bruno Robineau	02 40 98 78 76	brobineau(a)orange.fr
44	St Aignan-de-Grand Lieu	Solange Goan	06 81 18 30 12	somigoan(a)gmail.com
44	Couëron	Luc Gouverneur	06 30 03 00 98	coueron-esperanto(a)orange.fr
44	Herbignac	Jean-Yves Santerre	02 40 88 96 98	jys.mys(a)club-internet.fr
44	St Nazaire	Chantal Barret	02 40 01 97 27	patchdomo(a)yahoo.fr

NB- "(a)" est utilisé à la place de "@" dans les adresses courriels données dans le VT pour éviter que ces adresses soient spammées suite à la diffusion du VT sur Internet.

On a pu faire des erreurs de copie, veuillez contrôler vos coordonnées et si vous constatez des erreurs ou changez de coordonnées, veuillez en aviser Josette Ducloyer. Merci d'avance !

Le VT sera diffusé par internet. Cependant, pour ceux qui désirent recevoir la version papier, certains clubs pourront l'éditer. Si vous désirez le recevoir **par la Poste**, s'adresser à :

Manjo Clopeau 02.90.73.37.10 manjo.clopeau[a]gmail.com 12 rue de la Drisse 56450 **Theix**

KURSOJ 2023-2024

Grupo/asocio	tago	horaro	Instruisto/responsulo	loko
Lannion	mardo	18h-19h30	Maja	Maison de la Solidarité
Plouézec	lundo	14h komencantoj	Alexis	
‘	‘	14h progresantoj	Noël Reysset	
‘	‘	15h15 babilantoj	Jeanne	
‘	‘	17h progresantoj	Noël Reysset	
Pleudaniel	ĵaŭdo	18h-19h30	Pierre Cardona	urbodomo
St Brieuc	ĵaŭdo	18h15-19h45 komencantoj	P.Y Jégou	MJC
‘		progresantoj	P.Y.Jégou	MJC
Plérin	Lundo	Lernejoj 11-12 j	Murielle Caré	mezlernejo
Dinan	ĵaŭdo	ĉiujn duŝemajnojn 18h-20h	Philippe Stride	Foyer du Jeune Travailleur
St Malo	merkredo	14h30	Anne-Marie Argney	Broussin 67, r des 6 Frères Ruellans
Vannes	lundo	14h-16h	Ewa/ Elinjo Ledru	
Douarnenez	Lastan mardon de la monato		Malkovro de Esperanto en lingva kafumo/ Ŝanjo	Café La Cale à Rosmeur

Rilate al heredaĵo

Enquête sur les fonds concernant l'Espéranto.

Enquête sur les fonds (livres, archives, objets) concernant l'espéranto

Espéranto-France initie une enquête sur l'état des fonds concernant l'espéranto, détenus par des associations ou des particuliers, afin d'identifier ce qui pourrait être versé dans des institutions publiques, et participer ainsi à la sauvegarde de la mémoire et du patrimoine de l'ensemble des mouvements espérantistes français.

Il s'agit d'identifier et de qualifier les documents et objets que vous possédez : imprimés, revues, journaux, livres, articles, courriers, correspondances, comptes rendus, livres de comptes, photos, cartes postales, affiches, manuscrits, matériels pédagogiques, supports audio et audiovisuels, objets, etc. C'est-à-dire tout ce que vous possédez en lien avec l'espéranto et quelles que soient la langue et la date.

Afin de réaliser cette cartographie, nous avons besoin d'informations les plus précises possibles, notamment en évaluant la quantité de vos documents en nombre de mètres linéaires et

en décrivant leur qualité. Pour chaque question, il est possible d'ajouter des commentaires. N'hésitez pas à nous signaler par ailleurs les personnes possédant des fonds mais n'ayant pas accès à ce formulaire.

Voici le lien vers l'enquête :

<https://framaforms.org/enquete-sur-les-fonds-livres-archives-objets-concernant-lesperanto-1679816173>

Si vous souhaitez y répondre sur une version papier, merci d'en faire la demande à archives-esperanto@groupe.renater.fr, ainsi que pour toutes questions. Vous pouvez également demander une copie papier du formulaire au siège d'Espéranto-France (tél. 01 42 78 68 86)

À vos claviers et merci d'avance de participer à la sauvegarde de notre histoire espérantiste !

Okazis kaj okazos.

Prelego pri Aŭrovido en Pluezeko

La 1-an de julio okazis en Pluezeko prelego de Ewa Grochowska pri Aŭrovido. Ewa estis invitata de Roger Eon, kiu gastigis ŝin dum kelkaj tagoj. La prelego estis ege interesa, ĉirkaŭ 20 homoj ĉeestis.

Ĉu vi jam aŭdis pri Aŭrovido ? Ĝi estas « urbo del futuro », situata apud Pondichery, sude de Barato, elpensita de Sri Aŭrobindo kaj Patrino dum la jaroj 1960, kaj inaŭgurita en 1968, iom antaŭ la morto de Patrino.

Se oni rigardas la urbon ekde la ĉielo, oni vidas spiralon, en kies centro staras la Matrimandir, ora sfero 36 metrojn da diametro, en kiu estas konservita grandega kristala globo, sur kiu reflektiĝas la sunradioj. Tuj ĉirkaŭ la Matrimandir etendiĝas ĝardenoj, kaj poste komencas la « urbo de Aŭrovido » : domoj meze de arboj kaj densa vegetalaro. Kiam oni scias, ke tiu loko antaŭe estis dezerto, oni mezuras la impresan laboron realigitan ekde la komenco. La domoj ne apartenas al la rezidantoj, sed al la Komunumo.

De kie venas la rezidantoj ?

La plej reprezentataj nacioj en 2023 estas : Baratanoj (1812), Francoj (427), Germanoj (236), Italoj (172), Usonanoj (165), Nederlandanoj, Rusoj, Britoj, Hispanoj, Koreanoj, Israelanoj, ktp.

Aŭrovidanoj agas en multaj direktoj : permakulturo, produkto da spirulino, renoviĝantaj energioj, natura konstruado, loka mono, ŝparado de akvo, komerco de sanaj vestaĵoj, ktp.

Ewa iris plurfoje al Aŭrovido. Ŝi ŝategas tiun lokon, same kiel Pawel Kowalczyk, kiu restadis tie dum 6 monatoj kiel volontulo en 2011, kaj rakontas siajn impresojn en libro : « Ruĝaj vojoj de Aŭrovido ». Ewa tradukis la libron el la pola al la Esperanta lingvo.

Ewa emas starigi paralelon inter la penso de Zamenhof kaj tiu de Patrino :

Ekzemple, pri novaj ideoj, L.L.Zamenhof skribis : « Ĉiuj ideoj, kiuj estas ludontaj gravan rolon en la historio de la homaro, havas ĉiam tiun saman egalan sorton : kiam ili ekaperas, la samtempuloj renkontas ilin ne sole kun rimarkinde obstina malkonfido, sed eĉ kun la neklarigebla malamikeco. ...la pioniroj de tiuj ĉi ideoj devas multe batali kaj multe suferi, oni rigardas ilin kiel homojn frenezajn, infane malsaĝajn, aŭ fine, kiel homojn tre malutilajn. ...ili renkontas nenion krom moko kaj atakoj. »

Kaj Patrino : « Se vi konsentas marŝi are, la vivo estas relative facila, kun ĝiaj bonaj kaj malbonaj momentoj. Se vi deziras vivi alimaniere, milo da fortoj unuiĝas por ke vi faru kiel aliaj kaj vi malkovras la bonege organizitan malliberigon. »



Ewa klopodas iniciati en Aŭrovidon kursojn pri Esperanto. Nun la angla estas la plej uzata lingvo, sed Esperanto plibone taŭgas, pro la diverseco de naciecoj, kiuj tie renkontiĝas.

Maja

Anoncoj.

Eŭropa Kongreso (germana-franca) okazos 8a-12-a de majo 2024 en Strasburgo

Jen la ligilo <https://esperanto-france.org/congres-europeen-2024>

Aŭtune eblos aliĝi al la kongreso. Ni deziras krei bretonan grupon por kunvojaĝi kaj trovi loĝejon. Ĉu tiu propono interesas vin?

1. Aliĝu al la kongreso 2. Kontaktu Ŝanjo-n en decembro 2023 chantalallen9@gmail.com

La 109-a **Universala Kongreso** okazos en Aruŝo, Tanzanio de la 3^a ĝis la 10^a de aŭgusto 2024

<https://uea.org/kongresoj> <https://uk.esperanto.net/2024/>

Jen la Unua Bulteno https://uea.org/pdf/uk2024/Unua_Bulteno_UK2024_Arusxo.pdf

En Aruŝo ekzistas ĉiuj servoj, kiujn oni trovas en ĉiuj grandaj urboj: diversaj hoteloj, busoj, ATM-aŭtomatoj, polico, bankoj, apotekoj, malsanulejoj ktp. Kaj plia bona novaĵo: por alikontinentanoj ne estas devigo havi vakcinon por eniri Tanzanion! Bonvolu jam nun komenci plani vian vojaĝon al la 109-a UK. Aruŝo ĝojas bonvenigi vin ĉiujn por spertigi vin pri la bunteco kaj riĉeco de Tanzanio, la hejmo de gravaj mirindaĵoj. Tie la LKK preparas por vi agrable neforgeseblan kongreson en 2024. La kongresa temo estas: 'Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo'. Bonvolu konsideri...kaj nun aliĝi al la 109-a Universala Kongreso por ĝui la plej favorprezan aliĝperiodon!

Ni deziras krei bretonan grupon. Ĉu tiu propono interesas vin?

1. Aliĝu al la kongreso antaŭ la 31-an de decembro por rabato

2. Kontaktu Ŝanjo-n antaŭ la 31-an de decembro chantalallen9@gmail.com

Réservez vos week end.

L'hommage à Gaby Tréanton aura lieu le dimanche 17 mars après-midi à Saint Quay Perros. Le matin, aura lieu l'AG de la FEB.

L'association **Plouézec-Esperanto** vous invite à un week-end les samedi et dimanche 7 avril 2024. Rencontres. Conférences. Tourisme. Formation. Programme à suivre. L'AG d'Armor Esperanto aura lieu à cette occasion

Nikol Rizonni désire revivifier l'association TEVA (tutmonda esperanto vegetarisma asocio) et propose une rencontre les 13-14 juillet 2024 à Paimpont (Ille-et-Vilaine), au village de la Guette dans l'éco-lieu animé par Alexis Robert.

Pour **adhérer à la FEB**, il suffit d'être membre d'une des associations locales bretonnes (adhérentes à la FEB). Si vous n'êtes pas membre d'une association locale de la FEB et si vous souhaitez adhérer individuellement à la fédération, donnez vos coordonnées et envoyez votre cotisation de 20 € (si vous habitez dans l'un des départements 22, 29, 35, 56) ou 12 € (si vous habitez hors département 22, 29, 35, 56) par chèque à l'ordre de Fédération Espéranto-Bretagne à l'adresse suivante : Esperanto-Bretagne, Manjo Clopeau, 12 rue de la Drisse, FR-56450 Theix (France)

La FEB édite sa revue « la Verda Triskelo » et la liste de discussion Bretonio : <https://esperanto-france.org/sympa/info/bretonio>. La revue « la Verda Triskelo » n'est plus imprimée sur papier mais éditée électroniquement sur le site <https://bretonio.esperanto-france.org/>. Envoyez vos articles pour le prochain numéro avant le 17 Février. - Si vous n'êtes pas encore inscrit sur la liste Bretonio, voici la démarche à suivre : Envoyer un mail vide à bretonio-abono@esperanto-france.org. Pour inscrire plusieurs personnes, adressez vous à Xavier <xgodivier@gmail.com>

Adiaŭ Martine !

Martine Davoust forlasis nin la 25-an de aŭgusto. Kelkaj el vi renkontis ŝin, ĉu en esperantistaj renkontoj, ĉu en botanikaj ekskursoj, kiujn ŝi ofte gvidis kaj komentis talente.

Martine naskiĝis la 24-an de januaro 1947 en la urbo Chartres.

Post lernado kun bazlerneja instruisto ŝi studis en universitato naturajn sciencojn, geologion kaj zoologion, ĝis la magistra nivelo, por instrui en mezlernejoj.

Ŝi komencis sian karieron kiel instruisto, unue mallonge en Nogent le Rotrou; poste ŝi estis nomumita Bretonio, kaj inaŭguras la novan elementan publikan lernejon en Branderion (Morbihan) ĉirkaŭ 1977 aŭ 1978, en ununura klaso.

En la 1980-aj jaroj, la esperantistaj grupoj de la urbo Hennebont kaj de la germana urbo Kronach (Bavario) okazigis la oficialan ĝemeliĝon de siaj urboj. Martine komencis korespondadon kun iuj esperantistoj el Kronach, kaj konkretigis tiun rilaton per bicikla veturado tra la 1 300 km inter la du urboj. Tiu ĉi ĝemeliĝo ebligis multajn interŝanĝojn inter la mezlernejoj kaj la liceoj de la urboj. La esperantistaj grupoj ofte renkontiĝis kaj starigis fortajn amikajn ligojn, kiuj ankoraŭ daŭras inter la malmultaj postvivantoj. Martine partoprenis en ĉiuj el tiuj renkontiĝoj.

Aldone al sia laboro kiel instruisto, ŝi multe laboris bonvole en asocioj aŭ botanikaj institucioj : mikologia asocio de Plœmeur (Morbihan) en la 80-aj jaroj, Botanika Societo Centr-Okcidenta (SBCO), gvidanto de botanikaj malkovraj ekskursoj en diversaj asocioj, partopreno en reto de determino kaj nombrado de plantoj. Ŝi kunlaboris kun la « Nacia Botanika Konservatorio de Brest », kaj la asocio « Bretagne Vivante », kie ŝi responsis la botanikan grupon Morbihan, gvidante ekskursojn.

Fine ŝi partoprenis en la esperantigo de la flaŭr-vortoj de Georges Chaussade kaj Claude Roux, por la Franca Asocio de Likenologio.

Malkovrinte la ekziston de Esperanto dum ferio en Hispanio, ŝi eklernis ĝin en 1980 en Hennebont, kun Frédéric Le Magadure.

En 1998 ŝi partoprenis en la Universala Kongreso de Esperanto en Montpellier.

Komence de la 2000-aj jaroj ŝi instruís Esperanton en sia bazlernejo kaj dum unu jaro ŝi iniciis ankaŭ kelkajn el la patrinoj. Ŝi emeritiĝis en 2002.

En 2010, la Esperanto-grupo, (sekcio de la « Foyer laïque d'Hennebont »), kreis la asocion « Espéranto-Pays de Lorient », por pli disvastigi la instruadon de Esperanto en la regiono de Lorient. Ekde tiu jaro, Martine instruis Esperanton ĉiun mardan posttagmezon, ĝis junio 2023-a. Ŝi ankaŭ partoprenis ĉiumerkrede la matenajn babiladojn kun la praktikantoj de Hennebont.

Ŝi tre mankos al ni...

La Esperanto-grupoj de Hennebont kaj Lorient.



Aroma

Delonge mi konas Aroma-n.

En 2004 Trigo Peng el Wuhan partoprenis la internacian renkontiĝon en Pluezek kun grupo da 6 gelernantoj, el kiuj Aroma. Amuza anekdoto: Iliaj valizoj estis perditaj kaj nur 5 tagojn post ilia alveno finfine alvenis per speciala kamiono el la pariza flughaveno al Pluezek. Dum tiu tempo la responsuloj de la renkontiĝo petis de aliaj partoprenantoj, ke ili pruntedonu vestaĵojn. Tiam alvenis por ili amaso da puloveroj, pantalonoj kaj eĉ kalsonetoj kaj mamzonoj... Dum la tuta renkontiĝo mi instruis al ili Esperanton per la rekta metodo kaj post la renkontiĝo Jean-Pierre kaj mi invitis ĉiujn en Iffendic. La 27an de aŭgusto 2004, ili estis oficiale akceptitaj en la salonoj de la urbodomo de Rennes.

En oktobro 2009, Jean-Pierre kaj mi kun miaj gelernantoj André kaj Ellen ekflugis al Ĉinio kaj ĝuis mirindan semajnon en Wuhan. Tie ni vizitis la hejmon de Aroma kaj kune ĝuis en oktobro la nacian feston kaj la feston de la Luno.

En junio 2014 ŝi venis denove al Bretonio, ĉifoje kun sia fratino Ruĝa. Ni akceptis ilin en nia nova hejmo en Montfort-sur-Meu, kie ili ŝategis rikolti la ĉerizojn... En Rennes Aroma renkontis la membrojn de la esperanto asocio kaj prelegis.

Ĉijare ŝi projektis vojaĝi du monatojn en Eŭropo. Unue ŝi partoprenis la Universalan Kongreson en Torino kaj poste rekte vojaĝis al nia hejmo en Montfort kie ŝi restadis du semajnojn. Kune ni iom turismis en la ĉirkaŭaĵo, ekzemple al la lago Trémelin, fama foto eksponejo en La Gacilly aŭ megalitoj en Monteneuf. Ni vizitis en Saint-Suliac la geamikojn, kiuj vizitis Wuhan kun ni en 2009 kaj ŝi pasigis kelkajn tagojn ĉe Anne-Marie Argney en Saint-Malo, kie ŝi prelegis. En nia hejmo ŝi multe helpis min en la kuirejo sed ankaŭ en la ĝardeno, kaj ŝi progresis en la lingvo Esperanto.



De du monatoj Jean-Pierre kaj mi havis bronkiton kaj al ni mankis iom da energio, do mi petis helpon de aliaj esperantistoj. Pluraj familioj bonvolis akcepti ŝin kaj mi elektis la plej facile atingeblajn per la trajno, en la Nantes regiono, en la ĉirkaŭaĵo de Saintes kaj finfine en Tuluzo ĉe la filino de Trigo Peng. Ĉe Solange Goan en St Aignan-de-Grand-Lieu ŝi reklamis pri Esperanto en forumo de asocioj kaj promenis laŭ la lago. Kun Christiane Lamy, kiu gastigis ŝin en Couëron, kaj aliaj esperantistoj de la asocio, ŝi promenis laŭ la rivero Luaro kaj trapasis ĝin perprame, vizitis en Nantes ne nur la kutimajn lokojn, kiel pasejon Pommeraye, Reĝan Placon, Placon Graslin, Kastelon de la Dukoj, la elefanton, sed ankaŭ diversajn artajn ekspoziciojn, interalie tiun en Muzeo de Artoj, kaj ankaŭ la belan kolekton de maskojn ekspoziciitan kadre de la somera evento « Vojaĝo en Nanto ».



Ŝi finis sian restadon per tago de « naturo », promenante en la agrablaj Insulo Versailles kaj Ĝardeno de Plantoj. Tiuj tutokupitaj tagoj, plenplenaj je interŝanĝoj kaj je reciprokaj malkovroj, pasiĝis en bona humoro kiel kutime, feliĉaj pro la malfermo al la mondo dank'al tiu bela komuna lingvo, kiu nomiĝas Esperanto. Ĉe Bruno kaj Maryvonne Robineau, okaze de vilaĝa festo, ŝi povis malkovri la vilaĝajn tradiciojn kaj la lokajn kostumojn de la regiono Anjou. Kun kelkaj anĝevaj esperantistoj, ŝi vizitis la malnovajn kvartalojn kaj la kastelon de Angers sub la sperta gvido de Laurent kaj ŝi promenis en la vitejoj kaj gustumis la vinberojn. Anne kaj Claude Jausions konkludas: Aroma estas ĉarma, helpema, ĉiam preta malkovri nian vivostilon kaj la regionon de Royan kiu tre plaĉis al ŝi. Kvankam ŝi venis el Bretonio, ŝi longe estis kaptita de la etoso de la strando, la oceano, la haveno kaj de la vilaĝo Talmont. Kiel vi povas imagi, ŝi ĉiam fotadis per siaj du telefonoj/fotaparatoj!



Ŝi finis la francan rondvojaĝon per la lasta halto en Tuluzo, ĉe Peonio, la filino de Trigo Peng, vojaĝis kelkajn tagojn en Hispanio kaj ekflugis al Ĉinio la 27an de septembro.

Bonvolu pardoni, ke ŝi povis atingi nek Rostrenen, nek St Michel-en-Grève nek Douarnenez, kie ŝi estis invitita, ĉar mankis tempo kaj rimedoj po tien veturigi ŝin.

Ĉiuj estis ege kontentaj akcepti tiel afablan, helpeman kaj gajan personon.

Josette Ducloyer, laŭ la raportoj de la gastigintoj

Somera renkontiĝo en Douarnenez

La 26-an de julio, grava tago por esperantistoj, alvenis en Douarnenez Peter el Slovenujo, lia familio kaj amikoj. Ni festis la tagon de Esperanto kun krespoj, cidro kaj kantoj. Ĝoja vespero, riĉa renkontiĝo. La grupo ĝuis la feriojn malgraŭ terura vetero. Peter instruas geografion. Li ankaŭ kultivas bienon de olivarboj kaj lavado.

Jen intervjuo de Peter Grbec pri sia Esperanta vivo:

Mi ekkonis Esperanton kiam mi estis 16 jaraĝa. Mi bone memoras, kiam mi unue aŭdis pri Esperanto. Lernante la anglan lingvon en lernejo, ni legis artikolon, kiu parolis pri tio, ke ne nur la angla sed ankaŭ iu al mi nekonata lingvo strebas iĝi la dua lingvo por ĉiuj. La artikolo estis titolita « A second language for everyone» (Dua lingvo por ĉiuj). En tiu artikolo iu angla universitata profesoro rakontis, ke Esperanto estas parolata en la tuta mondo kaj ke multaj homoj—ankaŭ en Jugoslavujo parolas ĝin.

Kvankam tiam mi loĝis en Slovenujo, kiu ekestis post la disfalo de Jugoslavujo, mi neniun konis, kiu scipovis paroli tiun lingvon, kiu estis en la artikolo priskribita kiel simpla kaj facile lernebla. Post tiu tago mi forgesis pri tiu lingvo dum jaroj , ĝis en 2006, mia tiam koramikino, nun edzino, iris al Zambio dum tri monatoj por helpi homojn kiuj malsaniĝis pro AIDSo. Pro tio mi subite havis multege da tempo. Unu vesperon mi sidis antaŭ la ekrano kaj io revokis en mian memoron Esperanton. Mi eĉ forgesis la nomon de la lingvo do mi entajpis en retumilon : la dua lingvo por ĉiuj. Tie aperis la brazila Kurso de Esperanto (KaPe). Mi pensis, ĉu dediĉi unu horon de mia tempo al lernado de tiu lingvo aŭ ne. Bonŝance mi decidis jese kaj pro tio Esperanto iĝis mia nuntempa plej grava ŝatokupo.

Lernante Esperanton mi tuj konstatis, ke la brazila kurso estis tradukita en multajn lingvojn, sed kiel kutime, ne ankoraŭ en la slovenan, mia gepatra lingvo. Multfoje la slovena estis neglektita pro sia malmultnombra parolantaro je nur 2 milionoj. Post 2 monatoj da lernado de Esperanto, mi decidis traduki ĝin al la slovena. Ĉi-jare post 17 jaroj mi kaj miaj kursanoj en Izola retradukis la brazilan kurson per mia tiama traduko ĉar certe post nur 2 monatoj da studado ĝi necesis iom da purigado kaj plibonigo, ĉu ne ? Tamen la unua traduko estis sufiĉe bona kaj mi ekkonis kelkajn homojn, kiuj lernis Esperanton per mia traduko.

Nuntempe, profesie, mi estas instruisto pri geografio sed mi ankaŭ tre ŝatas instrui Esperanton. Ĉi-jare mi gvidis tri kursojn. La unua kurso de Esperanto celas instrui Esperanton al lernantoj en elementa lernejo en Koper, kiu estas tamen-malsimila al via, ĉar mi precipe instruas al infanoj 12, 13, 14 jaraĝaj – tiu estas por vi mezlernejo. Ĉi-jare dek knabinoj lernis Esperanton. Granda motivigo estis por ili vizito de 48 francaj gelernantoj el la urbo Salins-les-Bains, kiu ankaŭ lernis Esperanton por tiu evento. La duan kurson ĉeestas emerituloj en inter generacia centro en Izola. Mi devas gratuli al ili ĉar tri el ili kaj mi trapasis KER ekzamenojn ĉi-jare je la niveloj B2 kaj C1. La trian kurson mi gvidas rete per Google Meet, kiu similas al Zoom. Tiu kurso estas interesa ĉar estas malfermita al tuta Slovenujo. Ni anoncis la kurson per vizaĝlibro (fejsbuko) kaj komence 30 gelernantoj regule vizitis la kurson. Iom post iom la nombro malkreskiĝis sed tamen preskaŭ 10 finis 30 horan kurson.

Krom gvidi 3 kursojn, mi estas ankaŭ pasportservano. Do, mi tre ŝatas gastigi homojn. Ĉi somere vizitis min familio el Ĉeĥujo. La patro estas eksa akademiano kaj li parolas kun siaj tri infanoj nur en Esperanto, do mi gastigis denaskulojn kaj mi vere ŝatis paroli kun junaj infanoj en perfekta Esperanto. Ili aĝis 2, 5 kaj 7 jaroj. Kiel mi diris, mi multe kunlaboras kun Emmanuel Debrières, franca esperantisto, kiu ankaŭ instruas en Salins-les-Bains. Aprile 2023 li venis kun 48 lernantoj al Slovenujo kondiĉe ke ili lernu Esperanton. Tio multe motivigis min



kaj miajn lernantinojn, kiuj dum la tuta lerneja jaro diligente lernis Esperanton en lernejo unu horon semajne kaj kelkaj eĉ hejme solaj per Duolingo. Kiam la francoj finfine alvenis mi parolis kun ili nur en Esperanto. Emmanuel iomete tradukis sed la laborlingvo estis Esperanto. La francoj estis inter 15 kaj 18 jaraĝaj, miaj estis 12, 13, 14. La diferenco inter la aĝoj ne estis tiom granda. Ni montris la lernejon, ili havis multe da demandoj. Poste ili estis en la klasoĉambroj por vidi kiel funkcias la instruado en Slovenujo kaj je la fino ni eĉ organizis korbopilkadan matĉon inter slovenoj kaj francoj. La vizito okazis la 25-an de aprilo 2023. La teamoj estis miksitaj je 3 viroj kaj 2 virinoj. Ĉiuj lernantoj venis spekti la matĉon, kiu okazis nur danke al Esperanto. Emmanuel Desbrieres eĉ faris videon pri tio. La francoj certe volas reveni venontjare kaj mi esperas ke ankaŭ ni povos vojaĝi al Francujo.



Por la futuro mi certe agados en la instrua kampo. Mi estas instruisto, mi instruas geografion 22 horojn semajne, sed mi ankaŭ tre ŝatas instrui Esperanton.

Jen video pri la vizito de francaj lernantoj en Slovenujo kaj Italujo :

<https://www.youtube.com/watch?v=ECbhkxWZrQE>

Chantal Allen

Pri lingvoj

Du nomkategorioj

La landnomoj en Esperanto apartenas al du kategorioj: landobazaj nomoj kaj gentobazaj nomoj.

Landobazaj nomoj

La unua kategorio estas tiu de la landobazaj nomoj. En tiaj nomoj ordinare la radiko havas landan signifon, kaj oni uzas la sufikson AN por formi nomon de la landanoj. Ekzemple:

- Kanado → kanadanoj (anoj/loĝantoj de la lando Kanado)
- Andoro → andoranoj (anoj/loĝantoj de la lando Andoro)
- Pakistano → pakistananoj (anoj/loĝantoj de la lando Pakistano)
- Alĝerio → alĝerianoj (anoj/loĝantoj de la lando Alĝerio)

Iuj landobazaj nomoj estas kunmetaĵoj aŭ plurvortaĵoj. La baza radiko tamen ne nomas genton. Ekzemple:

- Ebur-Bordo → ebur-bordanoj
- Sud-Afriko → sud-afrikanoj
- Orienta Timoro → orient-timoranoj

En iaj okazoj la nomo estas tiel longa aŭ kompleksa, ke oni apenaŭ povas uzi AN kiel sufikson. Tiam oni devas anstataŭe uzi esprimon kun la vorto anoj, aŭ kun loĝantoj aŭ simila vorto:

- Antigvo kaj Barbudo → anoj de Antigvo kaj Barbudo

Kelkaj landobazaj nomoj finiĝas je ...lando. Tiam ordinare -land- estas parto de la radiko:

- Irlando → irlandanoj (la radiko estas IRLAND)
- Nederlando → nederlandanoj (la radiko estas NEDERLAND)

En iaj okazoj tamen temas pri kunmetaĵo kun la Esperanta radiko LAND, sed la elemento antaŭ LAND ne estas nomo de gento:

Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj → anoj de Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj, emirlandanoj (emiroj ne estas gento, sed speco de regantoj)

La kategorio de landobazaj nomoj entenas la grandan plimulton de la landnomoj en Esperanto.

Gentobazaj nomoj

La dua kategorio, la gentobazaj nomoj, koncernas nur malplimulton da landnomoj. (Landoj kun gentobazaj nomoj troviĝas precipe en Eŭropo, sed ankaŭ en Azio kaj Afriko.) En tiu kategorio la baza radiko nomas genton aŭ popolon. Oni ordinare formas la nomon de la lando per la Fundamenta sufikso UJ aŭ per la neoficiala sufikso I. Ekzemple:

francoj → Francujo/Francio (la lando de la francoj)

japanoj → Japanujo/Japanio (la lando de la japanoj)

En kelkaj gentobazaj nomoj oni uzas la radikon LAND anstataŭ UJ/I, pro internacieco aŭ Esperanta tradicio:

poloj → Pollando (la lando de la poloj)

svisoj → Svislando (la lando de la svisoj)

Sed kompreneble oni povas ankaŭ en tiaj okazoj uzi UJ/I: Polujo/Polio, Svisujo/Svisio. En la ĉi-postaj listoj de rekomendataj landnomoj, la Akademio prezentas ses gentobazajn nomojn kun LAND anstataŭ UJ/I, ĉar la formoj kun LAND estas pli kutimaj por tiuj nomoj. Sed la Akademio neniel kontraŭas la respondajn formojn kun UJ/I. Inverse ankaŭ eblas ĉe tiuj landoj, por kiuj la Akademio rekomendas formon kun UJ/I, anstataŭe uzi formojn kun LAND (Danlando, Angllando k.s.). Sed ĝenerale estas preferinde uzi LAND tiamaniere nur kiam la rezulta formo havas Esperantan tradicion.

Por paroli pri la loĝantoj de lando kun gentobaza nomo, oni ordinare uzas la simplan popolvorton: francoj, japanoj, poloj, svisoj k.t.p. Sed kompreneble oni ankaŭ povas uzi la sufikson AN: francujanoj/francianoj, japanujanoj/japanianoj, pollandanoj, svislandanoj k.t.p. Se oni uzas AN ĉe tiaj landnomoj, tiam oni memoru, ke oni devas aldoni AN al la landnomo, ne al la popolnomo: francujanoj/francianoj (ne “francanoj”); pollandanoj (ne “polanoj”).

Rekomendoj pri Landnomoj

Pro respekto al la tradicio, kaj en pacema spirito, ni deklaras, ke landnomo estas taŭga, se ĉiuj aŭ la granda plimulto senkonteste uzas la saman formon.

En okazo de konflikto inter du aŭ pluraj formoj por unu sama landnomo aŭ ankaŭ inter la uzo de kategorio aŭ la alia por unu sama radiko, la Akademio rekomendas preferi la plej internacian landnomon kaj tiel obei al la 15-a Regulo de la Fundamento.

La Akademio rekomendas konsideri, ke la signifo-rilatoj inter la landnomoj kaj la koncernaj landano-nomoj ĉiam estas principe la samaj, kiu ajn estas la kategorio de la landnomoj. Ekz-e, Angl-ujo / -io - Angl-oj kaj en la alia kategorio Nederland-o - Nederland-anoj.

Principe estas malrekomendite nove formi nomon per iu internacia “sufikso” aŭ sufikse uzata fremda vorto (-io, -(i)stano, ...), se la tiel ricevita landnomo ne jam ekzistas internacie.

(Senŝanĝe el Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto, n-ro 4, 1985.)

Pluraj el la ŝanĝoj en tiu ĉi revizio konsistigas aplikadon de la unua kaj plej grava el la ĉi-antaŭaj kvar principoj, kun speciala atento al la nuna lingvouzo. Landnomoj rekomendataj de la Akademio de Esperanto

La ĉi-postaj listoj enhavas ĉiujn nunajn landojn, kiuj estas membroj de UN, kaj ankoraŭ kelkajn pliajn landojn

(inkluzive de tri landoj, kiuj malaperis aŭ disiĝis post 1989).

Mallongigoj:

FdE

la radiko aperas en la Fundamento de Esperanto

8OA

la (popola aŭ landnoma) radiko estis oficialigita en la Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro

9OA

la (popola aŭ landnoma) radiko estis oficialigita en la Naŭa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro

*

la nomo estas gentobaza

AA

dulitera internacia landokodaĵo laŭ ISO-3166 (se tia kodaĵo ekzistas)

Afriko8OA

Alĝerio8OA DZ; Angolo AO; Benino BJ; Bocvano BW; Burkino BF; Burundo BI; Centr-Afriko CF; Ĉado TD; Ebur-Bordo CI; Egiptujo/Egiptio* EG; Ekvatora Gvineo8OA GQ; Eritreo ER; Etiopujo/Etiopio*8OA ET; Gabono GA; Gambio GM; Ganao GH; Gvineo8OA GN; Gvineo-Bisaŭo8OA GW; Ĝibutio DJ; Kaboverdo CV; Kameruno CM; Kenjo KE; Komoroj KM; Kongo (Demokratia Respubliko Kongo, Kongo Kinŝasa) CD; Kongo (Respubliko Kongo, Kongo Brazavila) CG; Lesoto LS; Liberio8OA LR; Libio8OA LY; Madagaskaro MG; Malavio MW; Malio ML; Maroko8OA MA; Maŭricio MU; Maŭritanio MR; Mozambiko MZ; Namibio NA; Niĝerio NG; Niĝero NE; Ruando RW; Santomeo kaj Principeo ST; Sejŝeloj SC; Senegalo SN; Sieraleono SL; Somalujo/Somalia* SO; Sud-Afriko ZA; Sudano8OA SD; Svazilando* SZ; Tanzanio TZ; Togolando TG; Tunizio8OA TN; Ugando UG; Zambio ZM; Zimbabvo ZW.

Ameriko8OA

Antigvo kaj Barbudo AG; Argentino AR; Bahamoj BS; Barbado BB; Belizo BZ; Bolivio8OA BO; Brazilo8OA BR; Ĉilio CL; Dominika Respubliko DO; Dominiko DM; Ekvadoro8OA EC; Grenado GD; Gronlando GL; Gujano GY; Gvatemalo8OA GT; Haitio HT; Honduro HN; Jamajko JM; Kanado8OA CA; Kolombio CO; Kostariko8OA CR; Kubo8OA CU; Meksiko8OA MX; Nikaragvo8OA NI; Panamo8OA PA; Paragvajo8OA PY; Peruo8OA PE; Salvadoro SV; Sankta Kristoforo kaj Neviso KN; Sankta Lucio LC; Sankta Vincento kaj Grenadinoj VC; Surinamo SR; Trinidado kaj Tobago TT; Urugvajo8OA UY; Usono9OA US; Venezuelo8OA VE.

Azio8OA

Afganujo/Afganio* AF; Armenujo/Armenio*8OA AM; Azerbajĝano AZ; Bangladeŝo BD; Barato (= Hindujo/Hindio*) IN; Barejno BH; Birmo8OA MM; Brunejo BN; Butano BT; Ĉinujo/Ĉinio*9OA CN; Filipinoj PH; Hindujo/Hindio* (= Barato) IN; Indonezio ID; Irako8OA IQ; Irano8OA IR; Israelo9OA IL; Japanujo/Japanio*9OA JP; Jemeno YE; Jordanio JO; Kamboĝo KH; Kartvelujo/Kartvelio* GE; Kataro QA; Kazahujo/Kazaĥio* KZ; Kirgizujo/Kirgizio* KG; Kuvajto KW; Laoso LA; Libano8OA LB; Malajzio MY; Maldivoj MV; Mongolujo/Mongolio* MN; Nepalo NP; Nord-Koreujo/Nord-Koreio* KP; Omano OM; Orienta Timoro TL; Pakistano8OA PK; Rusujo/Rusio*FdE RU; Sauda Arabujo/Sauda Arabio*8OA SA; Siberio; Singapuro SG; Sirio8OA SY; Srilanko LK; Sud-Koreujo/Sud-Koreio* KR; Taĝikujo/Taĝikio* TJ; Tajlando* TH; Tajvano TW; Turkmenujo/Turkmenio* TM; Turkujo/Turkio*FdE TR; Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj AE; Uzbekujo/Uzbekio* UZ; Vjetnamujo/Vjetnamio* VN.

EŭropoFdE

Albanujo/Albanio*8OA AL; Andoro AD; Anglujo/Anglio*FdE; Aŭstrujo/Aŭstrio* AT; Belgujo/Belgio*8OA BE; Belorusujo/Belorusio* BY; Bosnujo/Bosnio* kaj Hercegovino BA; Britujo/Britio*9OA GB; Bulgarujo/Bulgario*8OA BG; Ĉeĥujo/Ĉeĥio* CZ; Danujo/Danio*8OA DK; Estonujo/Estonio*8OA EE; Finnlando* FI; Francujo/Francio*FdE FR; Germanujo/Germanio*FdE DE; Grekujo/Grekio*8OA GR; Hispanujo/Hispanio*FdE ES; Hungarujo/Hungario*8OA HU; Irlando8OA IE; Islando8OA IS; Italujo/Italio*8OA IT; Kipro CY; Kosovo; Kroatujo/Kroatio* HR; Latvujo/Latvio*8OA LV; Lihtenŝtejno LI; Litovujo/Litovio* LT; Luksemburgo LU; Makedonujo/Makedonio* MK; Malto MT; Moldavujo/Moldavio* MD; Monako MC; Montenegro ME; Nederlando8OA NL; Norvegujo/Norvegio*8OA NO; Pollando* PL; Portugalujo/Portugalia* PT; Rumanujo/Rumanio*8OA RO; Rusujo/Rusio*FdE RU; Sanmarino SM; Serbujo/Serbio* RS; Skotlando*; Slovakujo/Slovakio* SK; Slovenujo/Slovenio* SI; Svedujo/Svedio*8OA SE; Svislando* CH; Turkujo/Turkio*FdE TR; Ukrainujo/Ukrainio* UA; Vatikano VA.

Oceanio

Aŭstralio8OA AU; Fiĝio FJ; Kiribato KI; Marŝaloj MH; Mikronezio FM; Nauro NR; Nov-Zelando NZ; Palaŭo PW; Papuo-Nov-Gvineo PG; Salomonoj SB; Samoo WS; Tongo TO; Tuvalo TV; Vanuatu VU.

Eksaj landoj

Ĉeĥoslovakujo/Ĉeĥoslovakio* (Eŭropo); Jugoslavujo/Jugoslavio* (Eŭropo); Sovetio, Sovet-Unio (Eŭropo/Azio).

La tuta mondo

Afganujo/Afganio* AF; Albanujo/Albanio*8OA AL; Alĝerio8OA DZ; Andoro AD; Anglujo/Anglio*FdE; Angolo AO; Antigvo kaj Barbudo AG; Argentino AR; Armenujo/Armenio*8OA AM; Aŭstralio8OA AU; Aŭstrujo/Aŭstrio* AT; Azerbajĝano AZ; Bahamoj BS; Bangladeŝo BD; Barato (= Hindujo/Hindio*) IN; Barbado BB; Barejno BH; Belgujo/Belgio*8OA BE; Belizo BZ; Belorusujo/Belorusio* BY; Benino BJ; Birmo8OA MM; Bocvano BW; Bolivio8OA BO; Bosnujo/Bosnio* kaj Hercegovino BA; Brazilo8OA BR; Britujo/Britio*9OA GB; Brunejo BN; Bulgarujo/Bulgario*8OA BG; Burkino BF; Burundo BI; Butano BT; Centr-Afriko CF; Ĉado TD; Ĉeĥoslovakujo/Ĉeĥoslovakio*, Ĉeĥujo/Ĉeĥio* CZ; Ĉilio CL; Ĉinujo/Ĉinio*9OA CN; Danujo/Danio*8OA DK; Dominika Respubliko DO; Dominiko DM; Ebur-Bordo CI; Egiptujo/Egiptio* EG; Ekvadoro8OA EC; Ekvatora Gvineo8OA GQ; Eritreo ER; Estonujo/Estonio*8OA EE; Etiopujo/Etiopio*8OA ET; Fiĝio FJ; Filipinoj PH; Finnlando* FI; Francujo/Francio*FdE FR; Gabono GA; Gambio GM; Ganao GH; Germanujo/Germanio*FdE DE; Grekujo/Grekio*8OA GR; Grenado GD; Gronlando GL; Gujano GY; Gvatemalo8OA GT; Gvineo8OA GN; Gvineo-Bisaŭo8OA GW; Ĝibutio DJ; Haitio HT; Hindujo/Hindio* (= Barato) IN; Hispanujo/Hispanio*FdE ES; Honduro HN; Hungarujo/Hungario*8OA HU; Indonezio ID; Irako8OA IQ; Irano8OA IR; Irlando8OA IE; Islando8OA IS; Israelo9OA IL; Italujo/Italio*8OA IT; Jamajko JM; Japanujo/Japanio*9OA JP; Jemeno YE; Jordanio JO; Jugoslavujo/Jugoslavio*; Kaboverdo CV; Kamboĝo KH; Kameruno CM; Kanado8OA CA; Kartvelujo/Kartvelio* GE; Kataro QA; Kazahujo/Kazaĥio* KZ; Kenjo KE; Kipro CY; Kirgizujo/Kirgizio* KG; Kiribato KI; Kolombio CO; Komoroj KM; Kongo (Demokratia Respubliko Kongo, Kongo Kinŝasa) CD; Kongo (Respubliko Kongo, Kongo Brazavila) CG; Kosovo; Kostariko8OA CR; Kroatujo/Kroatio* HR; Kubo8OA CU; Kuvajto KW; Laoso LA; Latvujo/Latvio*8OA LV; Lesoto LS; Libano8OA LB; Liberio8OA LR; Libio8OA LY; Lihtenŝtejno LI; Litovujo/Litovio* LT; Luksemburgo LU; Madagaskaro MG; Makedonujo/Makedonio* MK; Malajzio MY; Malavio MW; Maldivoj MV; Malio ML; Malto MT; Maroko8OA MA; Marŝaloj MH; Maŭricio MU; Maŭritanio MR; Meksiko8OA MX; Mikronezio FM; Moldavujo/Moldavio* MD; Monako MC; Mongolujo/Mongolio* MN; Montenegro ME; Mozambiko MZ; Namibio

NA; Nauro NR; Nederlando8OA NL; Nepalo NP; Niĝerio NG; Niĝero NE; Nikaragvo8OA NI; Nord-Koreujo/Nord-Koreio* KP; Norvegujo/Norvegio*8OA NO; Nov-Zelando NZ; Omano OM; Orienta Timoro TL; Pakistano8OA PK; Palaŭo PW; Panamo8OA PA; Papuo-Nov-Gvineo PG; Paragvajo8OA PY; Peruo8OA PE; Pollando* PL; Portugalujo/Portugalio* PT; Ruando RW; Rumanujo/Rumanio*8OA RO; Rusujo/Rusio*FdE RU; Salomonoj SB; Salvadoro SV; Samoo WS; Sankta Kristoforo kaj Neviso KN; Sankta Lucio LC; Sankta Vincento kaj Grenadinoj VC; Sanmarino SM; Santomeo kaj Principeo ST; Sauda Arabujo/Sauda Arabio*8OA SA; Sejŝeloj SC; Senegalo SN; Serbujo/Serbio* RS; Siberio; Sieraleono SL; Singapuro SG; Sirio8OA SY; Skotlando*; Slovakujo/Slovakio* SK; Slovenujo/Slovenio* SI; Somalujo/Somalia* SO; Sovetio, Sovet-Unio; Srilanko LK; Sud-Afriko ZA; Sud-Koreujo/Sud-Koreio* KR; Sudano8OA SD; Surinamo SR; Svazilando* SZ; Svedujo/Svedio*8OA SE; Svislando* CH; Taĝikujo/Taĝikio* TJ; Tajlando* TH; Tajvano TW; Tanzanio TZ; Togolando TG; Tongo TO; Trinidad kaj Tobago TT; Tunizio8OA TN; Turkmenujo/Turkmenio* TM; Turkujo/Turkio*FdE TR; Tuvalo TV; Ugando UG; Ukrainujo/Ukrainio* UA; Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj AE; Urugvajo8OA UY; Usono9OA US; Uzbekujo/Uzbekio* UZ; Vanuatuo VU; Vatikano VA; Venezuelo8OA VE; Vjetnamujo/Vjetnamio* VN; Zambio ZM; Zimbabvo ZW.

Pri la karaktero de tiu I (uzata post popolvortoj anstataŭ UJ) ekzistas diversaj opinioj. Iuj rigardas ĝin kiel efektivan sufikson (kvankam neoficialan), dum aliaj preferas rigardi ĝin kiel eron de aparta landnoma radiko paralela kun la responda popolnoma radiko. Tiuj diversaj analizoj ĉiuokaze ne faras praktikan diferencon en la uzado de tiaj landnomoj kiel Francio, Rusio, Japanio kaj Ĉinio. En tiu ĉi dokumento la Akademio ne alprenas starpunkton pri tiu teoria demando.

Esperanto-Stacio

Allemagne. *Inaugurée le 11 mai 2023, la gare Espéranto (Esperanto-Stacio) est un lieu événementiel international et un centre culturel situé dans la gare de Halbe, au sud de Berlin, qui propose un programme de cours international sur les langues, la paix et les droits de l'homme et de nombreuses offres en tant que centre culturel régional.*

La Esperanto-Stacio estas internacia renkontiĝejo kaj regiona kultura centro en la trajnstacio de Halbe (germane Halbe) tuj sude de Berlino, meze de natura parko. Ene oni organizas kursojn, atelierojn kaj kulturajn aktivadojn kaj oni ofertas ejojn kaj loĝejojn por eventoj, kursoj kaj festoj.

La stacio estis konstruita en 1865 kiel parto de la fervoja linio Berlino-Vroclavo en tiama Prusio. La Esperanto-Stacio estas parto de historie protektita konstruaĵaro, kiu konsistas el tri tipe prusaj fervojaj konstruaĵoj (vardomo, pasaĝera konstruaĵo, imperiestra stacidomo).

La teretaĝo konsistas nun el tri salonoj en la eksa restoracio, la biletejo kaj la pasaĝera halo. La dua etaĝo ofertas modernajn, komfortajn loĝejojn en la eksaj apartamentoj de la fervojistoj kaj de la staciestro.



Halbe estis fama pro sia brikindustrio. La brikoj uzitaj por konstrui multajn domojn en Berlino estis senditaj de la Esperanto-Stacio. Du grandaj argilaj truegoj en Halbe estis uzitaj por la produktado de brikoj. Poste, la truegoj estis plenigitaj je akvo kaj ili nun estas du puraj kaj belegaj lagoj, kiuj troviĝas tre proksime de la Esperanto-Stacio.

Esperanto-Stacio
Bahnhofstraße 30, 15757, Halbe, Germany
info@esperantostacio.com
+49 176 24714203

<https://www.esperantostacio.com/>

Ĉu la *Novparolo* de Orwell estas kritiko de Esperanto ?

Mi ĵus finis legi 1984 kaj la priskribo de la konstruo de Novparolo memorigis min pri Esperanto. Ekzemple, en Novparolo, oni konstruas novajn vortojn kunligante du vortojn kiel pensokrimo aŭ duoblo penso. Do mi deziris scii ĉu Novparolo estas kritiko de Esperanto.

Mi serĉis sur la reto kaj trovis ke probable Orwell uzis Esperanton kiel ekzemplo de konstruita lingvo. Li konis Esperanton ĉar sia onklino, kiu estis esperantistino, edziĝis kun Eugène Lanti, fama esperantisto. Ili interparolis antaŭ la verkado de 1984. Dum la lingvoj prezentas similecon en la konstruaĵo, la celo estas tute alia. Kiam Novparolo intencas redukti vortprovizon por finfine redukti pensmanieron, Esperanto proponas komunikadon al la tuta homaro. La unua estas ilo de subpremo, la dua estas ilo por pli bona komunikado kaj scio inter homoj el diversaj landoj, gepatraj lingvoj kaj kulturoj.

Alexis Lecat (Pluezek asocio)

Traduko de libro

“Por pra-arbaro en okcidenta Eŭropo” Francis Hallé

Francis Hallé estas botanikisto kaj biologo, fakulo pri arboj kaj tropikaj arbaroj.

La asocio « Francis Hallé por pra-arbaro » agas por krei vastan spacon (ĉirkaŭ 70 000 ha) en kiu arbaro libere evoluanta renovigos kaj disvolvos siajn vegetaĵaron kaj bestaron sen neniu homa interagado, dum periodo de pluraj jarcentoj. Tiu areo, ne ankoraŭ lokalizata, estos translima, kun franca bazo.

Kio estas pra-arbaro ?

Mallonga priskribo por komenci : pra-arbaro – kelkfoje nomata « antikva » aŭ « virg » arbaro -, estas alta arbaro, en kiu la plej malnovaj arboj atingas, ĉiu en sia propra specio, maksimumajn dimensiojn en alto, en baza diametro de sia trunko kaj amplekso de siaj radikoj.

Dank'al la arboj, vivantaj kaj mortintaj, grundoj estas aparte fekundaj, kaj la biologia diverseco estas maksimuma. Tio donas al la pra-arbaro neatenditan rolon, samtempe tiun de kreskejo kaj muzeo pri ĉiaj estaĵoj.



Ĝi estas malhela arbaro, ĉar la kanopeo estas tute fermita, krom kompreneble ĉe mezvarmaj latitudoj kaj vintre, kiam la arboj estas senfoliaj.

La pra-arbaro tamen ne estas monotona ; la spacoj kreitaj de la falo de mortintaj arboj kaj la senarbejoj paŝtitaj de grandaj plantomanĝuloj, faras agrable varian pejzaĝon.

Mi esperas, ke ĉiuj senkulpigos min pri tiu subjektiva opinio, por mi esenca : inter ĉiuj arbaroj, la praaj estas la plej belaj. Beleco ĝis nun ne havis la gravecon, kiun ĝi meritas en sciencaj eldonaĵoj pri arbaroj, kaj tiu manifesto celas plenigi tiun mankon.

Kontraste, la rekreskinta arbaro estas malalta, ĝiaj arboj estas junaj, tro multnombraj, kaj ĝiaj trunkoj estas malfortaj. La kanopeo estas truita per gapaj truoj, kiuj memorigas al ni la dehakitajn arbegojn ; biodiverseco estas etigita, precipe pro ĉasado kaj rikolto de morta ligno.

La graveco de la longa tempo

Priskribi ne sufiĉas ; indas konsideri la pason de la tempo kaj demandi : de kie venas la pra-arbaro. Ĝi estas arbaro kiu, « teorie », ek de sia origino, neniam estis ŝanĝita de homaj agadoj.

Kial « teorie » ? Tiu limigo estas necesa pro tio, ke homoj trairis tra ĉiuj arbaroj de la mondo, elprenante tion, kion ili bezonis : kuracajn plantojn, manĝeblajn foliojn, fungojn, ĉasbestojn, ovojn, mielon, fruktojn, kaj kompreneble lignon, tiel ke ĉiuj arbaroj sur la planedo estis ekspluatataj, kelkfoje eĉ kulturebligataj, sed – kaj tio estas la plej grava punkto – se pasis sufiĉe longa tempo ekde la ŝanĝoj, la pra-arbaraj specifoj havis tempon por reaperi.

Ĉi tie, iom da teorio utilas : sur nuda grundo sen homa agado, kutime arbidoj kreskas spontane, kaj la arbaro emas reokupi la tutan surfacon. Finfine, la plej alta nivelo de ĝia evoluo kongruas kun pra-arbaro. Rekreskintaj arbaroj estas nur mezaj paŝoj, nestabilaj kaj riskantaj denove malaperi. Homaj agadoj daŭre kreskas, tiuj rekreskintaj arbaroj estas en konstanta danĝero de detruo, kaj, se tio okazas, oni revenas al la eko, la nuda grundo.

Tradukita de la klubo de Lannion, Junio 2023

Sumoo legado (Nova rubriko).

Ĉu vi partoprenas en la Sumoo Legado? Ĵen via spaco por komenti pri via legado.

Informoj pri Sumoo Legado: www.esperanto-sumoo.pl/

La Floroj de l'krepusko, de Serĝo Elgo (pseŭdonimo de Georges Lagrange)

La titolo tuj kaptis mian atenton. Ĉu ĝi rilatas al la poemaro de Beaudelaire *La floroj de l'malbono*, kiu skandalis la socion de la fino de la 19-a jarcento ? Tiel komenciĝas la poemo « Le crépuscule du soir »

*Voici le soir charmant, ami du criminel;
Il vient comme un complice, à pas de loup; le ciel
Se ferme lentement comme une grande alcôve
Et l'homme impatient se change en bête fauve*

Jen la ĉarma vespero, amiko de l'krimulo ;
Alvenas kiel komplico, per paŝoj de lupo; la ĉielo

Fermiĝas malrapide kiel granda alkovo
Kaj la senpacienca homo transformiĝas en sovaĝa besto

Polic-inspektoro **Kramer** alvenas en kvietaj eksmuelejoj serĉante spurojn. En la Universitato estis murdita vicministro pri armeo kaj armado. Troviĝas subskribo apud la kadavro :« *N* » kiel *Neĉajev*. Kramer vizitas Sinjoron **Pruvost**, profesoro pri historio kaj fakulo pri la XIXa jarcento, kiu interesiĝas pri terorismo. Dum la renkontiĝo, Pruvost konservas imponan sintenon kaj distanciĝas de la tuta afero. Aliflanke, Kramer ne staras sur kutima tereno kaj provas sensukcese devigi atakojn por malkovri malfortan flankon de sia kliento. Sen indikilo, li pensas perdi sian tempon. Tuj ŝanĝiĝas la tono de Pruvost kiam eniras junulino, Inna. Ĉu via filino ? demandas Kramer. Kun kurioza hezito kaj enigma rideto neas Pruvost.

Inna rajdas sian mopedon por rendevui kun Alekso sia amanto. Jes ŝi deziras forlasi lin, jes aperas kelkaj strangaj detaloj pri sia infaneco, tamen ŝajnas tute ordinara vivo. Ŝi kaŝas sian belecon surmetante reglementan kaskon kaj tiel ŝi povas slalomi anonime tra la urbo. Inna revadas kaj rememoras en intima mensostato pri la paradizaj tagoj de ŝia feliĉa infanaĝo. Ĉio ŝanĝiĝis ekde la naskiĝo de Sonja. Evidente, la patro preferis Sonja-n. La gepatroj sendis Inna-n al malproksima universitato por ŝiaj studentaj jaroj. Inna konkludis ke oni senbalastiĝis je ŝi. Ĉe familia amiko Pruvost ŝi sentas sin libera kaj protektata. Inna deziras forlasi Alekso-n tamen pensas esti posedata.

Ŝiberto.Teatra enscenigo okazas en la Universitato por la inaŭguro de nova konstruaĵo. La aŭlo estas plenplena je oficialuloj, profesoroj, studentoj, medianoj kaj policistoj pro la freŝdata atenco. Ĉio estas plej zorge pristudata kaj kontrolata. Sinjoro Ŝiberto, ministro pri teknologio, stariĝas, salutas kaj dankas la aplaŭdojn de la ĉeestantaro. Post parolado de la rektoro, de la arĥitekto kaj de la regionprefekto, Sinjoro Ŝiberto klarigas kiel li atingis sukceson dank'al volo, persistemo, dotiteco kaj inteligenteco. En kajuto, Albeno preparas sian pafilon.

Alteo. Tute alie, Alteo sidas sur matraco en kaduka loĝejo. La kunveno okazas sur la unua etaĝo, kiu ebligis salti tra la fenestro se policistaro enspruĉus. Post koda signalo, eniras unu post la alia, Kalendulo, Dianto, Roza, Viola, Konvalo, Lekanto kaj finfine Cejano. Ĉiuj prezentas sin per kromnomoj de floroj kaj estas kapuĉitaj. Alteo parolas kun akĉento kiun li mem fabrikis por misvoji spionojn. Neniu konas la vizaĝon unu de la alia. La grupo komentas pri la murdo de Ŝiberto. Ili ne partoprenis tamen rekonas ke tiu lasta evento komplikas la planon de la venonta murdo de ministro. Alteo postulas blindan obeon al siaj ordonoj. Sekvanta projekto estas 'inviti gaston'. Post la foriro de la aliaj, restas Alteo kiu tiras Roza-n sur la matrakon.

Fazol. En policejo Fazol atendas Kramer. De 10 jaroj li estas lia asistanto, ne tre inteligenta sed metodema. Ofte Kramer mokas lin sed Fazol tiel bone sukcesas kunmeti la faktojn kaj ordigi la enketon, ke Kramer tuj poste solvas la enigmon 'kvazaŭ plukante maturan frukton'. Li ne nur trovis kie la pafilo estis vendita sed ankaŭ kiu aĉetis ĝin. Li nomiĝas Albeno Lessor. Paŝon post paŝo evidentiĝas ke Lessor laboras kiel masonisto ĉe la entrepreno Dorat. Jes, Dorat konstruis la novan konstruaĵon, jes Albeno Lessor estas modela laboristo, ĉiam akurata, diligenta kaj negrublema. Post iom da tempo, ili finfine renkontiĝas kun la skipestro. En brua industria etoso, oni alvokas Albeno-n sed li malaperis. Laboristo indikas ke li havis rendevuon ĉe dentisto. Kun la adreso de Albeno, Kramer enketas dum Fazol estas komisiita esplori la apartamenton. La nura interesa elemento troviĝas en tirkesto: *Kara Beata, Mi devas forvojaĝi. Mi skribos al vi klarige. Kisojn. Alb.* Alvenas Beata: ne, Albeno ne suferas pro dentdoloro, fakte li eliris frue por viziti, kiel kutime, sian avinon, kiu edukis lin kaj lian fraton. Post longa misvojo, ili atingas la maljunulejon. La avino bone konis Ŝiberto-n. Ŝia filo, la patro de Albeno kaj de ties frato, estis honesta entreprenisto, sed lia laborejo suferis pro ŝuldoj. Ŝiberto ruze proponis asociiĝon. Baldaŭ la patro estis ruinata kaj Ŝiberto ŝtelis lian edzinon. Finfine la patro ĵetis sin sub la trajnon. La policistoj ricevas ankaŭ informon pri la alia frato Aleksandro, pli inteligenta, kiu studis en la universitato kaj poste malaperis eksterlanden.

Pruvost estas rabita kaj troviĝas en sinistra kelo. Li tute ne komprenas kion oni postulas de li. Kaskado de

eventoj instigas la leganton daŭrigi por scii plu ...

Sinjoro Alvin Ledyk prezentas sian bileton por Tunizo, sidigas en fotelo, prenas el sia valizeto *La floroj del malbono* kaj ĝuas relegi la lastan strofon:

*El roko fontas akvo, dezerton kovras floroj.
Antaŭ ĉi vojaĝantoj, por kies sorĉ-esploroj
La regno de l'tenebraj futuroj sin apertas.*

Kial mi ŝatas la libron ?

Romano originale verkita en Esperanto

Facile legebla

Okazas en ne kutima loko por detektiva romano: Universitato

Kiam kaj kien ĝi estiĝas ? La leganto estas transportita en nebula vojaĝo.

Originala formo. Ĉapitroj malsimilas unu al la alia. Ĉiuj ŝajnas sendependaj, tamen oni antaŭsentas ligilon.

Progreso de intrigo eltenas la leganton en streĉo ĝis la fino. Ne multe okazas ĝis ĉapitro 2 kaj subite neatendita murdo kuntrenas ĉenon de eventoj.

La duo Kramer kaj Fazol bone funkcias. La polic-inspektoro mokas lian helpiston sed rekonas lian valoron. Kramer rikoltas la detalan laboron de Fazol.

La talento de la verkisto Sergo Elgo vidiĝas en kontrasto de trajtoj inter la universitataj profesoroj, studentoj, policistoj kaj teroristoj.

La verkisto lerte kreas streĉan etoson. Pluraj konstruaĵoj situas en kvieta loko kaj ŝajnas en velkinta eĉ kaduka stato : eksmuelejo, forlasita loĝejo, sakstrato plenplena de aŭto-kadavroj, forlasita turo aŭ kaduka maljunulejo.

Ĉiu ĉapitro temas pri unu persono kaj tiel la leganto sekvas la pripenson kaj vivon de unu rolulo dum elekta periodo.

Kromnomoj de floroj: Alteo, Kalendulo, Roza kaj Lekanto ne kongruas kun la bildo de 'teroristoj' kies veraj nomoj estas: Alekso/Aleksandro/Alvin, Inna, Ronaldo ktp. Ĉiu junulo trakondukas paralelan vivon. Tiel ĝi duoblas la nombron de roluloj kaj kreas ĉe la leganto interesan kaĉon !

Ĉu heroo ? Ne vere. Naivuloj subpremitaj de fiuloj, certe : ĉefe Alteo kaj Lekanto, la plej inteligentaj el *Neĉajev*.
Legu kaj ĝuu !

Chantal Allen

Pri “Esperantista Vegetarano”, revuo de TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio)


Okaze de la Sumoo Legado en septembro 2023, mi legis la revuon “Esperantista Vegetarano” de januaro 2021.

La unua paĝo kiel kutime memorigas al ni pri la Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA) kiu estas kun UEA membro de EVU kaj IVU (Eŭropa kaj Internacia Unio de Vegetaranoj).

La movado estis fondita en 1908 kaj la unua Honora Prezidento nomiĝis Lev N. Tolstoj

Tre interesa enhavo donas deziron tuj legi la tutan revuon.

La nuna prezidanto Heidi Goes donas indikojn pri la membroj.



Ŝi ŝatus retrovi malnovajn revuojn EV, ĉar pluraj bibliotekoj jam petas ilin.

Legitaj artikoloj :

- **Intervjuo kun Stano Marček (Slovakio)** de Russ Williams (Usono/Pollando)

Stano estis redaktoro de TEVA kaj nuna Landa Reprezentanto de TEVA. Li enkondukis la artikolon per memprezentado kaj klarigis sian aligon al la vegana mondo.

Pri Esperanto: li eklernis kiel 12-jara lernanto en baza lernejo. Li ankaŭ estas muzikisto (gitaro, fluto, kontrabaso, ukulelo...) kaj manaĝero de la plej fama ĉeĥoslovakia rokmuŝika grupo TEAM. Krom pli ol mil grandaj koncertoj de TEAM, Stano prizorgis eldonon de unua albumo ankaŭ Esperante kaj preparis Esperantan turneon en Nederlando. La grupo koncertis dum kongresoj: Brajtono, Kerkrade, 62-a SAT. Li deziris revivigi muzikvesperon: nokta, mirinda, trans fulmotondro. Aliajn hobiajn li ŝatas: naturo, ĝardeno... La vivon li amas !

Pri la Rekta Metodo de Stano Marček: al li ne konvenis metodoj por gvidi kursojn de Esperanto do li ekpensis propran materialon. Por pli bone fari li studis psikologion de fremdlingva instruado kaj metodikon de Esperanto-instruado. Tio konfirmis al li ke la plej efika vojo estas tiel kiel niaj gepatroj instruis al ni la gepatran lingvon dum la ĉiutaga vivo.

La lernolibro unue aperis en la slovaka lingvo. Tuj poste pola amiko proponis traduki ĝin al la pola. Stano gvidis kursojn de Esperanto ankaŭ eksterlande do sekvis internaciaj eldonoj de la lernolibro. Ĝis la jaro 2021 la lernolibro aperis jam en 45 lingvoj.

- **Nova landa reprezentanto de TEVA en Italio:** Anna Barbara Hermann-Simari

Ŝi naskiĝis en Sarlando (Germanio) kaj kreskis en malgranda bieno. La patro laboris nokte en karbominejo kaj tage kiel farmisto. Ili havis 5 bovinon kaj ties idojn, 6 porkojn kaj 30 kokinojn kun virkoko. Ŝi kaj la aliaj infanoj kutimis helpi en kampoj aŭ staloj. Ĉiu bovino havis sian nomon. El la lakto ili faris buteron kaj fromaĝon por la familio kaj dufoje semajne vendis ilin al la najbaroj. Ili havis ankaŭ gardohundon kaj katojn por ĉasi musojn. Dum sia tuta juneco ŝi kaj la familio vivis kun bestoj kaj manĝis nur per memproduktita nutraĵo.

Ŝi naskiĝis preskaŭ blinda. Malgraŭ nombraj operacioj, ŝi iris en lernejon por blinduloj kaj malbonvidantoj. Post lernejaj jaroj ŝi abonis parolatan revuon por blinduloj. En 1980 blindulo de Palatino informis ŝin pri Esperanto. Tiam ŝi kontaktis Esperantistan Blindulan Ligon de Germanio (EBLoGo). Ŝi partoprenis en semajfina aranĝo kaj konatiĝis ankaŭ kun francaj kaj kanadaj esperantistoj. Poste, ŝi estis invitita partopreni en studperiodo kaj karnavalo en Francio.

Anna Barbara renkontis sian esperantistan edzon (Pier Luigi Simari) okaze de la Itala Junulara Festivalo en Porretta Terme (Italio). Ili geedziĝis en Germanio kaj translokiĝis al Sudtirolo en Norda Italio. La nova paro iĝis gastiganto de Pasporta Servo.

Poste, ŝi multe parolas pri sia malbona sano: gamboj, vertebraro, ostoj, kaj poste haŭto. Ŝi klarigas kiel, senĉese, helpita de sia edzo (kuracisto) ŝi, ĉiuforte, retrovis la sanon ellasante viandon, kolbasojn, fiŝojn, laktajojn, ĝis iĝi vegana ĉar ŝia korpo ne plu toleris lakton, ktp... Ŝi raportas pri la longaj, kelfoj akraj, diskutoj kun sia familio aŭ eĉ geamikoj, pro sia nova nutroregimo.

Ŝi vizitis plurfoje Lilia-n Fabretto-n en Romo, kiu parolis al ŝi pri TEVA.

Dankegon kaj bonvenon al Anna Barbara Hermann-Simari, nova landa reprezentanto en Italio.

- **Hajkoj** de Lode Van de Velde (Belgio)

<i>Hundon dorlotas</i>	<i>Malliberejo.</i>	<i>Fermas okulojn</i>	<i>Stimulas murdojn</i>
<i>aliajn bestojn manĝas</i>	<i>Neniam vidis la sun'</i>	<i>por besta suferado</i>	<i>Eŭropaj subvencioj.</i>
<i>Limigita am'</i>	<i>senkulpaj bestoj</i>	<i>viand-manĝanto</i>	<i>Povraj buĉbestoj</i>

- **Manĝi vegane en Montrealo dum la 107-a UK en 2022** de Normand Fleury (Kanado)

Vegetaranoj kaj veganoj estas feliĉaj: en Montrealo facilas manĝi vegetare kaj aĉeti veganajn manĝaĵojn. Normand Fleury diris ke unue la kongreso okazas en la Universitato, en la centro de Montrealo. Tie abundas veganaj restoracioj: kelkaj ekologiaj, kelkaj aziaj veganaj bufedoj kun suŝioj, shiitake-fungoj, sezamo... "Resto Vego" pioniris de 40 jaroj. Tiu restoracio situas en pli ol centjara konstruaĵo kun 3 etaĝoj da manĝejoj. Alie, populara restoracio servas ekologiajn kaj lokajn ingrediencojn kaj proponas diversajn trinkaĵojn, desertojn, kafojn, teojn. En alia vegana bufedo oni povas rapide manĝi bonguste kaj originale. Parizana "bistro" ĉe bela placo prezentas pladojn de la tuta mondo el freŝaj lokaj produktoj. Normand invitas nin bone manĝi subtenante lokan agrikulturon.

- **Akvo faba** de Lode Van de Velde (Belgio)

Ĉu vi aŭdis pri akvo faba, ankaŭ konata kiel aquafaba? Tio estas likvo en kiu oni metas kikerojn en bokalo aŭ ledskatolo. Eblas ankaŭ uzi la akvon en kiu estis kuiritaj sekaj kikeroj. Akvo faba enhavas proteinojn kaj povas anstataŭi ovojn en patkukoj, kukoj, vafletoj, ĉokolada ŝaŭmdeserto, molaj bombonoj (angle «fudge»), glaciaĵo, marcipano, eĉ en makaronoj kaj meringo. Fine, ĝi utilas ankaŭ por kelkaj salitaj receptoj kiel butero, majonezo, ajlOLEA saŭco kaj vegana mocarelo.

LVV klarigas pri rostitaj kikeroj kaj patkukoj kun akvo faba kaj montras belan foton de rostitaj kikeroj, hum ! Bela plado !

- **Averto sur la pakumo de bestdevenaj nutrovaroj** de Gary Mickle (Germanio)

Ĉu la **1-a de aprilo** estas tago de ŝercaj blagoj en la tuta mondo? Gary supozas. Germana sekcio de PETA (Homoj por Etika Traktado de Bestoj) raportis ĉi-jare je tiu dato :

Anstataŭ la «etikedo de besta bonfarto» pli antaŭe planita de la agrikultura ministro Cem Ozdemir, la federacia registaro enkondukas en aprilo 2022 avertajn mesaĝojn sur bestodevenaj produktoj kiel ĉe tabakaj produktoj. Anstataŭ la ĝisnunaj erarigaj bildoj de feliĉaj bovinoj kaj porkoj, la novaj etikedoj atentigas nin pri la realo, kiu regas en la bestoproduktado : ekspluato, sufero kaj morto de sennombraj vivaĵoj ...do, nun aperas pakumo de ovo, bovaĵo kaj lakto kun etikedo : « Por ĉi tiuj ovoj, kokinoj devis en turmento morti » « Unu burgero enhavas kadavro-pecojn de ĝis 6 mistraktitaj kaj murditaj bovoj » « Trinkado de ĉi tiu lakto faras bovidojn orfaj »

La rakonto diris ke la tempo ne sufiĉe maturiĝis. Eble post kelkaj jaroj !

Asocio TEVA

Prezidanto: S-ino Heidi Goes estraro@vegetarismo.info

Landaj Reprezentantoj: Belgio, Brazilo, Ĉinio, Germanio, Irlando, Israelo, Italio, Japanio, Kameruno, Nederlando, Pollando, Slovakio, Svislando, Usono.

Retadreso: sekretario@vegetarismo.info



Nikol Rizzoni (Francio) Sumoo legantino C5

Farendaĵoj notindaj en via kalendaro



La 109-a Universala Kongreso
Aruŝo, Tanzanio
3^a ĝis 10^a de aŭgusto 2024

<https://uea.org/kongreso>
<https://uk.esperanto.net/2024/>



Bonvenon en la kulturdomo Kastelo Gresillon

Hommage à Gaby Tréanton et AG de la FEB
Dimanche 17 mars, St Quay-Perros



Rencontres et AG d'Armor espéranto Plouézec

Samedi 6 et dimanche 7 Avril 2024



Eŭropa kongreso
En Strasburgo
8a ĝis 12a de Majo

Franca kaj germana ĉiujaraj
Esperanto-Kongresoj
Informoj :

<https://esperanto-france.org/congres-europeen-2024>

Mult-aktivaĵoj

16an ĝis la 22an de oktobro

Kantado en Esperanto de Interkant kun
Bernard Bigonnet, Esperantlingvaj
promenoj piede kaj bicikle kun Olivier
Buisson, enkonduko al Tango kun
Tahar & Claudine ...

Aŭtunas

**23an de Oktobro ĝis 2an de
Novembro.**

Kursoj kun Renée Triolle, Szilva Szabolcs,
Alain Delmotte aŭ Maja Mériaux
Trapasu Franca Esperanto Instituto ekzamenon

Prelegoj, origamo, programo por infanoj, ktp

Informoj sur

<https://gresillon.org>